

# H.E.J.S.

JUNULARA SEKCIO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

REDAKTORINO:  
F-INO ITZIAR ARTECHE

**Nro. 91**  
**Nov. - Dec. 1974**


Str. Barrencalle Barrena, 7 - 1.<sup>a</sup>  
Telefono 24 44 92 - BILBAO-5



**H. E. J. S.**

*deziras al vi  
sukcesplenan Novjaron.*





## ENHAVO

Kotizoj.....	1
Sciigoj.....	2
Kristnaskaj kantoj.....	3
TEJO : Pasporta Servo.....	4-5
Post 15 jaroj.....	6-7
eria kurso por instruistoj.....	10-11
Deziras korespondi.....	9
Ivo Lapenna:kelkaj el liaj pensoj	8-9
humoro.....	12

La enhavo de la artikoloj ĉi tie publikigitaj ne reprezentas la oficialan opinion de HEJS, escepte en okazo de oficiala komuniko; ĝi ankaŭ ne reprezentas la opinion de la Redaktoro; do, pri la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem

## KOTIZO

Jam estas tempo por ke vi komencu pagi la kotizon. Memoru, estas 100 ptoj, kvankam ni tre dankus se vi pagus 150 ptojn, ĉar la nuna kotizo ne sufiĉas kovri niajn elspezojn. Kiel ĉiam, vi sendu la monon prefere al nia konto 01332235-5 de "Banco de vizcaya", sciigante nin pri la sendo, ankaŭ per poŝtmandato (je nia nomo), aŭ al la koncerna delegito.

## CUOTA

HISPANE==HISPANE==HISPANE

Ya es hora de comenzar a pagarla. Como sabéis, son 100 \$, aunque agradeceríamos que enviaseis 150, porque la cuota actual no llega a cubrir los gastos. Enviadla a nuestra cuenta arriba resenada, o bien por giro postal (a nuestro nombre) o al correspondiente delegado.

## TENDARO

Venontan jaron, estu certaj, ni organizos tendaron en Zaragoza, de la 27<sup>a</sup> ĝis la 30<sup>a</sup> de marto. Komence de la jaro ni sendos al vi la aliĝilojn. Vi ĉiuj klepodu veni por ĝui la gajan etoson kiu, espereble, regos la tutan aranĝon. Ci foje, via partopreno estos ebla, ĉar ni elektis datojn dum la Paska Semajno.

## FOTA KONKURSO

Feliĉe, estis kelkaj reagoj al tiu nia iniciato. Bedaŭrinde, la kvalito de la fotoj ne estis sufiĉe bona, kaj ni decidis prokrasti la limdaton ĝis la 1<sup>a</sup> de februaro. Sed atentu, legu la regularon en n<sup>o</sup>86: la fotoj estu blanknigraj, formato inter 7x10 kaj 10x15, kaj havu vortojn aŭ frazon esperante kiel komentarion. Do, antaŭen, 1000 ptoj atendas vin!

## HISPANA KANTARETO

Ĉu ci ne kantas? Sendu tekstojn por ke ni traduku! Precipe, sudamerikaj kanzonoj estus facile tradukeblaj. Ĝis nun, ni nur tradukis kelkajn de "tuna".

## LOTERIO

Ankoraŭ, kiel vi scias, vi povas mendi loterion ĉe José Miguel Fernández, Gregorio de la Revilla 21-2<sup>a</sup> dcha. BILBAO-11. Limdato, la 10<sup>a</sup> de decembro.

Glitveturas ni  
Tiritaj per ĉeval'  
Ridas, kantas ni  
Ĉe kamp', ĉe mont', ĉe val'.

Sonas sonoril'  
Sur ĉevala vost'  
Bone amuzigas ni  
En la vintra frost'.



## Kristnaskaj Kantoj




(Ĝingiling)

Ĝingiling', ĝingiling'  
Tra la tuta voj'  
Glitveturi, kante huri  
Estas granda ĝoj'.

Ĝingiling', ĝingiling'  
Tra la tuta voj'  
Glitveturi, kante huri  
Estas granda ĝoj'.

## — Silenta nokto —

Paca nokt', Sankta nokt'  
Dormas jam tuta ter'  
Dum rigardas Lin ĝoja hom-par'  
Ĉarma bebo kun bukla harar'  
Kušas en trankvilec'  
Kušas en trankvilec'.



Paca nokt', Sankta nokt'  
Sonas nun tra l'aer'  
Dolĉa kanto de la angelar'  
Al la miranta ŝaf-paŝtistar'  
"Pacon al la homar'  
Pacon al la homar'".



tago  
25<sup>a</sup>

Paca nokt', Sankta nokt'  
Dia fil', Mondesper'  
Dum vi dolĉe ridetas al ni  
Dia amo montriĝas en vi  
Kristo, nia Savant'  
Kristo, nia Savant'.

Decembro-74

(El la "Kovina Kongres-Kantaro")

tejo :

pasporta  
servo

En 1974, 40 esperantistoj disponigis senpagan gastigon al esperantistoj, cele respondi al kreskanta bezono de junuloj transvojaĝi landlimojn kaj konatiĝi kun fremdaj vivmanieroj. Tiuj gastigantoj, —ofte esperantistoj kiuj ne havas multajn okazojn fari internaciajn kontaktojn, ĉu pro neeblo vojaĝi, ĉu pro izolita logloko— akceptis eksterlandajn gastojn, ĝuis la plezuron paroli la internacian lingvon kun "samideano", kaj akiris novajn amikojn tra la mondo. Temas, do, pri konkreta kaj utila apliko de la Internacia Lingvo.

Pri la disvolviĝo de la kampanjo en 1974 oni povas konsideri ke la timoj de kelkaj personoj —ke oni misuzos la publikigitajn adresojn kaj ĝenos la sindonemajn gastigantojn— ŝajne estis tute malpravaj, ĉar eĉ ne unu persono prezentigis sen antaŭa anonciĝo, nek sen kunporti pruvon de sia aliĝo al la Servo (la broŝurlisto), kaj, laŭ aserto de la gastigintoj mem, nenium problemon kreis la gastoj! Rekompense, la gastoj estis aparte bone traktitaj, ĉar ĉiuj ricevis almenaŭ matenmanĝon, kaj pli ol la duono ricevis ankaŭ la aliajn manĝojn. Neniu gastiganto postulis pagon por tio, kvankam ili ja rajtus.

La buĝetita kampanjo 1975, ĵus komenciĝinta, celas plivastigi la reton ĝis minimume 100 gastigantoj, el 25 landoj, tiel ke almenaŭ 50 gastigoj okazu, kaj 400 ekzempleroj de la broŝuro vendiĝu.

Tiucele, informado estas pliampleksigita kaj sistemigita: varbcirkulero estis sendita ne nur al ĉiuj gazetoj registritaj en UEA-jarlibro kaj selektitaj individuoj, sed ankaŭ al ĉefdelegitoj, ĉefurbaj delegitoj kaj fakdelegitoj pri turismo.

Ĉar Pasporta Servo pruvis sian vivkapablon, ĉu ne estas tempo ekkonsideri eblecojn por nacilingvaj informkampanjoj? Kial ne allogi homojn al lernado de esperanto, montrante al ili ĝian tuj elproveblan utilon? LERNU ESPERANTON KAJ GASTU SENPAGE, povus esti unu el la sloganoj de tia kampanjo, certe alloga ĉe junulara publiko.

Koncernataj unuavice estas kursgvidantoj, kiuj havas la problemon doni okazon al lernantoj uzi praktike sian

freŝan scion. Reklamante pri sia kurso nacilingvaj afiŝoj povus esti pendigitaj en lernejoj, universitatoj, junular-domoj kaj aliaj junularaj ejoj. La teksto prezentus ĉefe la Servon kaj menciis krome la rimedon por uzi ĝin: LERNI ESPERANTON.

En pluraj landoj la Servo jam havas kunlaboranton, sed neniu bonvolo estas troa, kaj mi volonte akceptos sin-proponojn de personoj kiuj deziras organizi tian varbkampanjon.

(El informoj ricevitaj de Cash-Liouville)



## — kontraŭ la kultura koloniismo —

La Kolombia Registaro ordonis al ĉiuj butikoj forigi de ĝiaj fasadoj la nomplatojn kiuj estas en aliaj lingvoj ol la hispana.

Okaze de la tago de la lingvo, la Nacia Registaro konsideris ke oni devas "uzi nian lingvon" kaj "kontraŭbatali unu el la multaj esprimoj de kultura koloniismo", kiu malhelpas la propran komunikadon.

En Kolombio, la plimulto el la butikoj kaj komercoj sin identigas per anglaj esprimoj kaj nomoj.

## - post 15 jaroj -

Hispana Esperanto Junulara Sekcio (H.E.J.S.) fondiĝis, kiel branĉo de Hispana Esperanto-Federacio (HEF) kaj Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), dum la XX<sup>a</sup> Hispana Kongreso de Esperanto, okazinta en Málaga (1959) (vd.: "HEJS", nro. 61-1969, p. 11-12). Nun, post 15 jaroj, mi klopodos analizi tiujn paŝojn kiujn nia Sekcio travivis dum tiom da tempo.

Tiam, kaj ankoraŭ nun, plej granda parto de la aktiva hispana esperantistaro loĝis en Katalunio. Tial ne estas strange ke la fondintoj de HEJS estis katalunoj kaj ĝuste tial la sidejo de HEJS estis tie ĝis la jaro 1970. Nu, dum 12 jaroj (1959-1970, ambaŭ inkluzive), la prezidanto estis Salvador Aragay. Li estis ankaŭ la redaktoro de "HEJS" (nia ligilo) de la komenco ĝis 1965 -dum 44 numeroj-, li estis nia reprezentanto en la komitato de TEJO ĝis 1964 kaj li, mi aldonas, estis la ĉiam preta kaj senlaca zorganto kaj respondeculo de nia junulara Sekcio. Li gvidis nian "ŝipon" dum malsamaj kondiĉoj kaj cirkonstancoj, eĉ foje sen plia kunlaboro, sed li sukcesis konduki nian "HEJS" tra sekuraj vojoj en la esperanto-movado. Kaj en la prestiĝo de nia Sekcio li ludis specialan meriton, tiel enlande kiel eksterlande.

Kiel plej gravaj atingoj dum tiuj jaroj oni povas konsideri: la organizadon de porjunularaj renkontiĝoj, ĝenerale dum la naciaj kongresoj (foje pompe nomataj Kongresoj); la okazigon, ankaŭ dum la naciaj kongresoj, de Oratoraj Konkursoj; la starigon de 1-a Laborplano (1962); la kontrakton inter Germana Esperanto-Junularo kaj HEJS (1963); la kreadon de Fondaĵo "Internacia Reprezentanto" (nur funkciis dum 1962, 1963 kaj 1964); la tradukkonkursojn (1965: katalune-esperanten kaj 1966: katalune-esperanten kaj kastile-esperanten); kaj la organizadon de la plej grava internacia junulara evento en nia lando: la 24-a Internacia Junulara Kongreso de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) en Tarragona (1968).

Plej sukcesaj organizaj jaroj estis 1962 kaj 1963, ĝenerale laŭ la modelo de T.E.J.O.; en 1964 la klopodoj celis plifirmigi la financon bazon de la Sekcio kaj jam en 1965 komenciĝis la krizoj (dum tiu jaro nur aperis 5 bultenoj, anstataŭ la 6 kutimaj), kvankam tiam naskis



la insignon de HEJS (poste ne uzata). Denove la eldonritmo estas normala en 1966 kaj tiam tute klare diras ke "oni devas imiti niajn gravajn organizojn U.E.A., T.E.J.O., H.E.F. kaj aliaj eksterlandaj asociojn, kies laboroj meritas laŭdojn kaj dankon." Sed jam ne eblis bremsi la internan krizon: en la jaro 1967 aperis 5 bultenoj kaj en 1968 nur 4. Verŝajne por la jaro 1968 ni devus diri ke ĉiuj fortoj kaj klopodoj estis por organizi la kongreson de TEJO. Denove normaleco estas en 1969, sed la krizo kulminis en la jaro 1970 kiam nur aperis 2 bultenoj kaj Salvador Aragay, pro manko de kunlaboro, estis preta transdoni la gvidadon de HEJS al novaj komitatanoj.

Dum tiuj jaroj nia ligilo, "HEJS", plej parte enhavis informojn, ĉu movadaĵojn ĉu ĝeneralaj, kvankam ankaŭ aperis artikoloj, poezioj, citaĵoj, krucvortenigoj. Lingvoj uzataj estis: esperanto, kastila, kataluna kaj vaska.

Cetere, estis du aliaj ŝajne atingoj de HEJS, kiuj ne estis tiaj: la unua estas aĉetado de multobligilo (vd.: "HEJS", nroj. 51 kaj 56) kaj la dua estas "H.E.F. Junulara Esperantista Restadejo H.E.J.S." (vd.: "HEJS", nroj. 42, 44, 45, 48, 49, 50, 51, 52, 53, 54, 55, 57, 58, 59, 60, 61, 62, 63, 65, 66 kaj 67). Tiuj aferoj, laŭ mia opinio, devus esti ricevintaj pliajn klarigojn, ĉar vere temis pri privataj proprietoj je sindona dispono de HEJS. Do, pro tiuj aferoj, la disponiganto meritas nian dankemon, sed ne HEJS nian gratulon.

Resume, la plej brilaj jaroj estis 1962 kaj 1963, kiam sendube la estraro, kopiante la organizan strukturon de TEJO, kaj agante plej entuziasme, pere de Ekskursaj, Korespondaj, Filatelaj kaj Informaj Fakoj kaj Internaciaj Rilatoj, junularaj delegitoj kaj anoncoj por la bulteno, Fondaĵo "Internacia Reprezentanto", renkontiĝoj kaj oratoraj konkursoj, kaj krome la akcepto de Laborplano, la subskribo de dokumento okaze de la 17-a IJK, la kontraktoj subskribitaj kun G.E.J., kaj kun aliaj ses junularaj sekcioj de TEJO (okaze de la 18-a IJK), atingis la plej gravajn sukcesojn, laŭ nombre. Ankaŭ, HEJS ricevis tiam invitojn por sendi 10 gejunulojn al Romo kaj 1 al Parizo.

JUAN AZCUÉNAGA

D-ro Ivo Lapenna eksiĝis el ĉiuj funkcioj en UEA dum la 59-a UK en Hamburgo. Sed la ideoj difinitaj de D-ro Lapenna ankoraŭ restos inter ni. Li komencis revoluciigi la tiaman esperanto-movadon kiam ankoraŭ juna li kontraŭstaris la 'internan ideon', "blufo kiu nur kaŝas la malsamajn ideojn de la samideanoj". Depost 1937 kiel komitatano, estrarano (ekde 1938), ĝenerala-sekretario (1955-1964) kaj prezidanto (1964-1974) de Universala Esperanto-Asocio (UEA), D-ro Lapenna estas pli aŭ malpli rekte la aŭtoro de ĉiuj gravaj iniciatoj kaj atingoj de la postmilita Esperanto-movado.

Ĝenerale, la esencaj gvidlinioj de la esperanto-movado estas difinitaj de D-ro Lapenna nur dum krizaj epokoj, ĉar ĝuste dum tiuj krizoj la esperantistaro bataladas por aŭ kontraŭ starigitan ideologion. Kiam li kiel 27-jarulo transprenis la gvidadon de Jugoslavia Esperanto-Ligo, kiam li kiel 29-jarulo eniris la estraron de Internacia Esperanto-Ligo (kiu poste, dank' plej parte al liaj klopodoj, fandiĝis kun Universala Esperanto-Asocio), li atakis la 'internan ideon', kiu ŝajnigas la ekziston de komuna ideologia bazo de la esperantistoj, pri kiu efektive oni entute ne plu povas paroli. Sed, jam antaŭe, li diris ke "la 'interna ideo' nenium plu povas entuziasmigi, ĉar ankaŭ dekjara bubeto hodiaŭ klare vidas ke abstraktaj ideoj ne kapablas sanigi la mondon, nek solvi la aktualajn problemojn."

Denove, dum la 37-a Universala Kongreso (UK) en Oslo, li aludis tiujn sentojn, "kiuj inspiras nian tutan agadon. Temas pri tio, kion iuj nomas 'interna ideo', aliaj 'interna sento', dum mi mem pli ŝatas paroli pri la 'solidariga rolo' de la Internacia Lingvo. Tute egale kiel oni ĝin nomas, temas pri tiu 'io', kiu faras ke nia lingvo ne estas nura teknika rimedo de komunikado internacia, sed, krome, ankaŭ potenca instrumento de internacia frateco."


Kiel reago pro atakoj al UEA aperintaj en "Amerika Esperantisto", D-ro Lapenna festparolis en Kopenhago, okaze de la 41-a UK, pri "Ideologiaj elementoj de esperantismo". Tie li esprimis ke "la Internacia Lingvo es-

tas esence, laŭ la naturo mem de la afero, ligita al difinitaj ideoj. Ŝajnas al mi ke mi ne eraras, se mi diras ke tiuj bazaj ideoj estas:

Unue, egaleco de ĉiuj rasoj kaj nacioj, do neta kaj senkompromisa kontraŭrasismo; due, tuthoma solidarereco kaj respekto de la homaj rajtoj, formulitaj nun tute klare en la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj; trie, libereco, ĉar nur en plena libereco esprimiĝas kaj floras la egaleco, kaj fortikiĝas la solidareco."

Tiuj ĉi ideoj estas bazo de du el plej traktitaj principoj en nia movado: demokrateco kaj neŭtraleco.

JUAN AZCUÉNAGA



## *Feria Metodika Kurso por Instruistoj pri Esperanto en Gdańsk (Pollando)*

*Michalina Prus*

Pola Esperanto-Asocio jam trian fojon organizis specialan metodikan kurson por volontuloj bone sciantaj internacian lingvon kiuj intencus instrui ĝin.

Kursoj estas organizataj ĉiam en Gdańsk, ĉe Balta Maro. Ĉi - jare ĝi okazis julie /15.7. - 1.8.74/, ĉeestis multnombra grupo de junularo /studentoj, junaj instruistoj, aliaj esperantistoj/. Etoso estis tre agrabla, dum dutaga ekskurso ni vizitis Gdańsk-regionon.

Trisemajnan lernadon fermis ŝtatekzamenoj /ĝenerala lingvoscienco, E-lingvo, metodikinstruado pri fremdaj lingvoj/, post kiuj ni ricevis atestilojn plenrajtigantajn instrui Esperanton en fundamentaj kaj mezlernejoj. Feliĉe finis ekzamenojn 30 personoj, nur krome unu.

Temoj de ĉiuj prelegoj tekstis kvaŝaŭ iom tro science, ekzemple: ĝenerala lingvoscienco, metodikinstruado pri fremdaj lingvoj, historio kaj gramatiko de Esperanto, logikeco en internacia lingvo, kritiko de lernolibroj, provlecionoj, evolucio de Esperanto en esperanta literaturo.

Lekciis konataj E-veteranoj kiel sinjoroj: J.Toczyski, A.Grela, A.Petty, L.Siekierski k. aliaj. Dank'al ili ni havis bonokazon aŭdadi belegan, puran lingvon kaj multe mem edukigi ĝin, ĉar prelegoj estis gvidataj nur

esperante, kio kreis boneblecon partopreni la kurson ankaŭ por eksterlandanoj.

Sekvonta, simila kurso estas organizota en 1976-a jaro.

Karaj gesamideanoj Vi ankaŭ partoprenu ĝin kaj samtempe Vi povas viziti nian landon.

### Deziras korespondi:

1. Irena Tomica,  
ul. Tysiąclecia 3/13, 43-403 C i e s z y n  
Pollando
2. Maria Snitkienė,  
235030 K é d a i n i a i P/K 59  
Litovio-Sovetunio
3. Matilda Kovács,  
Bezidu Nou 59, I n d. M u r e s  
Rumanio
4. Eliza Szczyrek,  
Chechły 90, 39-100 R o p c z y c e  
Pollando
5. Dovilė Rimantaite,  
Bendroji 12, 232040 V i l n i u s  
Litovio-Sovetunio
6. Elżbieta Tiunin,  
ul. Świętopełki 34 A/9, 87-100 T o r u ń  
Pollando
7. Heino Metsamärt  
Kunderi 7, 202900 V i l j a n d i  
Litovio-Sovetunio

# humor



afabla




gentila



servemø



diligenta...



hejme